



## 9-a TUT- AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Havano, Kubo  
11-17 februaro 2018

[www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu)

«Lingvoj kaj kulturoj:  
edukado por daŭripova  
evoluo en la Amerikoj»

## 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto: Edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La Loka Kongresa Komitato de la 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) invitas ĉiujn kubajn esperantistojn frue aliĝi al la kongreso por garantii ne nur nombran, sed kvalitan eventon per

aktiva partopreno de la landa movado. Aldone al tio ni invitas alilandajn esperantistojn veni kaj partopreni la regionan kongreson de la amerikaj landoj.

La kongresa temo de la 9-a TAKE, “Lingvoj kaj Kulturoj: edukado por daŭripova evoluo” estos

okazo por inviti la kongresanojn alproksimiĝi al la nuna stato de tiu ĉi agadkampo en nia regiono. Ĝi ligas al la streboj de Unesko kaj UN koncerne al edukado kiel koncepto kiu ampleksas ankaŭ kulturon.

La monda loĝantaro proksimumas je 7 mil milionoj da homoj kaj limigitaj natur-rimedoj, kaj tial, ni, kiel individuoj kaj socioj, bezonas kunvivi daŭripove; ni devas adopti regulojn respondece, surbaze de la konscio, ke tio kion ni faras hodiaŭ havos sekvojn en la vivo de la homoj kaj la planedo en la estonteco.

Edukado por daŭripova evoluo (EDE) enpovigas la homojn por ke ili ŝanĝu siajn pensmanierojn kaj laborformojn cele al daŭripova estonteco.

Inter la celoj de Unesko estas plibonigi la aliron al edukado bazita sur tiu principo de daŭripova evoluo kvalita je ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj kuntekstoj sociaj, por transformi la socion per eduka reordigo kaj helpi la personojn evoluigi konojn, kapablojn, valorojn kaj bezonatajn kondukmanierojn por daŭripova evoluo.

Tio signifas inkluzivigi temojn pri daŭripova evoluo, kiel klimatsanĝo kaj biodiverseco en la instruado kaj lernado. Oni instigas la individuojn esti mem agantoj respondecaj kiuj solvas defiojn, respektas la kulturen diversecon kaj kontribuas al kreado de pli daŭripova mondo.

Pri tiu ĉi temaro estos ja enkonduka prelego kun instigo al debato, interŝanĝo kaj komuna starigo de esencaj agadoj kiuj iamaniere konsciigu la regionan movadon pri la nuna situacio kaj konkretaj kaj realigeblaj agadoj per kiuj la Esperanto-komunumo povas kontribui al tiu ĉi debato ĉe internaciaj organizoj kiel UN kaj Unesko.

Via ĉeesto kaj kontribuo al la kongresa temo de la 9-a TAKE estas tre bonvena.

Ni atendas vin en Havano!

## Premio al la plej bona muziko por kuba filmo en la Internacia konkurso “Teo kaj Amo”

Danke al subteno de Esperantujo, la kolektado de konkursaĵoj por la dua konkurso “Teo kaj Amo” ricevis tre bonan rezulton. Partoprenis 77 filmetoj el 27 landoj kaj 4 kontinentoj – Argentino, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉinio, Ĉilio, Francio, Germanio, Italio, Indonezio, Kazahio, Kolombio, Kubo, Litovio, Nepalo, Pollando, Rusio, Turkio, Svedio, Svislando, Sud-Koreio, Slovakio, Ukrainio, Usono, Uzbekio, Venezuelo, Vjetnamio kaj Kongo (D.R.).

Dume pri la konkurso raportis amaskomunikiloj en Malajzio, Litovio, Ĉeĥio kaj Ĉinio.

Ankaŭ pli ol dukdek landaj, regionaj, urbaj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj multe helpis kaj subtenis la konkurson. Ok-membra ĵurio pritaksis la filmojn kaj decidis la premiojn aprile. Oktobre la

premiitoj senpage partoprenos en la filmfestivalo “Teo kaj Amo” en Ĉinio.

La premio en la kategorio plej bona originala muziko estis por “Kara li”, de la filmo “Teo-revoj en amo-taso” (Kubo). Temas pri originala poemo de Roy McCoy (Usono), muziko de Carlos Rafael Lolo Mendoza, interpretita de Miguel Ángel Sánchez Reyes, de la grupo Amindaj, kiun reĝisoras Graciela Morgado Rodríguez.

Invitite, 11 gajnintoj partoprenos premidonan ceremonion kaj la duan filmfestivalon “Teo kaj Amo”, kiuj okazos de la 22-a ĝis la 29-a de oktobro 2017 en la urbo Huzhou de la ĉina provinco Ĝeĝjango (Zhejiang). La invititoj estas tiuj, kiujn la ĵurio elektis la plej bonaj en jenaj kategorioj: fil-



Teo • Amo  
Konkurso de  
Mallongaj Filmoj

mo, scenaristo, reĝisoro, desegnofilmo, originala muziko, ĉefaktoro, ĉefaktorino, kameraisto, muntisto kaj Speciala Premio (Bona Dokumenta Filmeto / Bona Kreivo / Bona Prezento de Teo-Kulturo).

LA REDAKCIO

## Graveco de terminologia mastrumado en Esperantujo: faka interkompreniĝo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ

Danke al la subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF), Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Kuba Esperanto-Asocio (KEA), mi sukcesis partopreni por la dua fojo, la Terminologian Someran Kurson en Kolonjo, Germanio, organizita de TermNet – la Internacia Reto por Terminologio, de la 10-a ĝis la 14-a de julio 2017.

Partoprenis la kurson ĉirkaŭ 70 fakuloj pri terminologia kaj traduka agado el 15 landoj. Dum tiu ĉi kurso, mi sukcesis ne nur lerni pri terminologia mastrumado kaj ties gravega rolo por la faka interkompreniĝo, sed ankaŭ povis skize prezenti mian diplomlaboraĵon, kiu estas fakte, rezulto de mia unua interŝanĝo kun d-ro Detlef Reineke, unu el la trejnistoj de tiu kurso, kiun mi renkontis en 2014, kiam mi partoprenis unuafoje kaj kiu poste estis unu el la mentoroj de mia universitata diplomlaboraĵo. Ni daŭre kune laboras pri estontaj similaj projektoj.

En Kolonjo mi prezentis la rezulton de tiu ĉi esploralaboro, kaj la rilaton, ekde mia faka vidpunkto, inter la terminologia agado kaj sistemoj por reakiri informojn fokuse pri “Kiel agadi ekde la Informaj Sciencoj”; mi celas integriĝon de ambaŭ sciencoj. Dum la prezento mi informis pri Esperanto kaj pri la ekzisto kaj agado de la Terminologia Komisiono de UEA; ankaŭ pri la celdirekto al kiu indus survoĝigi la laboron de la komisiono, samkiel pri ĝiaj celoj. Kadre de la prezento estiĝis demandoj pri Esperanto.

Pensante pri praktikaj agadoj estontaj, mi sukcesis paroli kun mia mentoro kaj starigi la unuajn paŝojn rilate la organizadon de simila evento en Kubo venontjare okaze de la 9-a TAKE, tamen, granda demandosigno restas pri ĝi pro diversaj kialoj.

Krom la planado de la unuaj paŝoj, (tre bezonataj por ekorganizi similan eventon en Kubo, ekzemple), mi ankaŭ konatiĝis kun Beate Früh kaj Christian Galinski, ankaŭ trejnistoj



Ariadna García Gutiérrez prezentas sian diplomdisertacion “Dezajno de baza ontologio de la Kuba Esperanto-Kongreso”, dum la Terminologia Somera Kurso organizita de TermNet, en la Universitato de Aplikataj Sciencoj de Kolonjo, Germanio, 10-14 julio 2017. Foto: Retejo de TermNet.

de la kurso kaj spertaj fakuloj en la terminologia kaj traduka agado.

Kiel kunordiganto de la Terminologia Komisiono de UEA, mi konsideras ke indus trovi spacon por tiu ĉi fako kadre de UK-oj kaj regionaj

kongresoj, laŭeble, landaj kongresoj, por instigi interesitojn interŝanĝi spertojn, kunlabori, pridiskuti evoluigon de tiu ĉi fako en kunligo kun aliaj fakoj kaj kiel la novaj informteknologioj influas la terminologian kampon.

## Faka apliko aŭ terminologio?

La terminologia laboro dum multaj jaroj havis diversajn taskojn evoluigi tiun ĉi fakon en Esperantujo. Pri ĝi elstare zorgis Wera Blanke kiu verkis amplekse pri la temo. Ankaŭ ekzistas la informa centro de la Terminologia Esperanto-Centro (TEC), kiu celas respondi la bazajn demandojn pri terminologio en Esperanto.

Kio ĝi estas? Laŭ ĝenerala difino terminologio estas aro da teorioj kaj praktikoj ĉirkaŭ nocioj kaj terminoj, t.e. ĉirkaŭ “vortoj” uzataj en specialaj scio-kampoj por paroli pri ideoj aŭ objektoj, kiuj ne apartenas al ĉiutagaj konversacioj. Terminologio resume estas fako de aplikata lingvistiko, kiu okupiĝas multaspekte pri la komunikado inter fakuloj (sciencistoj, laboristoj, ktp). Ĝi tradicie havas preskriban ecojn (celojn), sed ĝi ankaŭ povas esti komplete priskriba. Simple esprimita, oni diru, ke terminologio estas scienco pri starigo de unu- aŭ plurlingvaj terminaroj (fakvortaroj).

Terminologio kiel scienco estas relative freŝdata. Efektive, la unuaj teorioj pri terminologio aperis nur en la 1930-aj jaroj, la unuaj internaciaj rekomendoj en la 1960-aj jaroj (publikaĵoj de Internacia Organizaĵo por Normigado, ISO) kaj fine la unuaj internaciaj normoj dum la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj. Tamen praagadoj similaj al tiuj, kiujn oni nun nomas terminologiaj, jam de longe ekzistis.

Kion fari por evoluigi la subevoluintan fakvortaron de Esperanto? Multaj pledas por la vojo, kiu tradicie en etnaj lingvoj gvidis al la ekesto de faklingvoj: unue verki pri fakaj temoj kaj poste kolekti la fakajn vortojn (aŭ terminojn) kaj kompili terminarojn.

Aliaj opinias, ke ne eblas fake verki sen disponi pri terminaroj, ke oni unue devas krei tiujn helpilojn, por poste apliki ilin en la praktiko.

Ĉu temas do pri la eterna problemo “kokino kaj ovo”? Eble ne. Mi preferus diri: temas pri la du flankoj de la sama medalo, ne disigeblaj unu de la alia. Kaj la solvon de la dilemo ni eble trovos en iu “samtempe”: la minimumo estas, ke aŭtoroj en glosaroj listigu (kun precizaj difinoj) la no-

vajn vortojn uzitajn en iliaj verkoj; la dezirinda maksimumo estas, ke fakuloj samtempe internacie kunlaboru pri terminaroj kaj (bazaj, enkondukaj) fakaj verkoj. Almenaŭ, okupiĝu pri kompilado, sistemigo kaj “kreado” de terminoj nur tiuj homoj, kiuj kapablas senerare apliki kaj elprovi ilin en faka kunteksto.

Ankaŭ pri la demando pri libera evoluo aŭ konscia reguligo ekzistas diversaj opinioj. Iuj diras: lasu la homojn verki laŭvole, lasu ilin krei la terminojn, kiujn ili bezonas – se ekestas per tio pluraj vortoj por la sama afero, ne gravas: la praktiko venkigos la plej taŭgan! Aliaj protestas: tio signifas anarkion, kaoson – oni devas konscie reguligi almenaŭ la fakajn lingvon. Terminoj estu la rezulto de normigo – faka diskuto ne eblas, se ĉiu partoprenanto uzas alian vorton por la sama afero aŭ komprenas sub la sama vorto ion alian!

Kiuj pravas? Ni ĵetu rigardon al etnolingva tereno: kiel progresas aliaj lingvoj rilate al siaj fakaj esprimoj?

Konsidere la faktan, ke la nombro de specialaj vortoj en unuopaj fakoj estas multoble pli granda ol en la ĝeneralaj vortaroj kaj plue saltrape kreskas, “libera evoluo” ne plu eblas, ĉar ĝi simple signifus rezignon pri interkompreniĝo. Aliflanke, dum ŝtorma evoluo de scienc-teknika revolucio la racie trankvila laboro de sistemigo kaj reguligo estas tre komplika, kaj plena sukceso en normigado de terminoj apenaŭ eblas.

Sed “plena normigado” eĉ ne necesas, aŭ, ni diru, eĉ ne dezirindas. Speciale en sociaj sciencoj, kie konceptoj de lando al lando, ofte eĉ de homo al homo, diverĝas, verŝajne ne eblas egaligi ĉiujn signifojn kaj kromsignifojn de iu vorto, sen difekti la fakulojn de diversaj “skoloj”. Kaj en teknikaj fakoj nek eblas, nek necesas, fiksi ĉiujn terminojn ĝis la lasta derivaĵo, ĉar la disvolviĝo de novaj realaĵoj kutime okazas pli rapide ol la normiga procedo.

Kie do estu la limoj inter normigo, reguligo, rekomendo kaj libereco? Tion devos pripensi, pridiskuti kaj decidi la koncernaj fakuloj en ĉiu aparta kazo. Gvida principo ĉi-rilate estas – same por etnaj kiel por planaj lingvoj – “necese kaj sufiĉo”.

Fonto: WERA BLANKE:

*Pri terminologia laboro en Esperanto, Mondial, Nov-Jorko, 2013.*

# Tra la spuroj de niaj klasikuloj

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Carilda Oliver Labra, elstara kuba poetino, naskiĝis en 1922 en Matanzas, urbo situanta oriente de Havano. Ŝi studis Juron en la Havana Universitato kaj oficis kiel juristino en sia naskiĝurbo.

En la enkondukaj vortoj de ŝia populara poemaro *Sude de mia gorĝo* el 1949, ŝi klarigas la privilegian spacon kiun ŝi donas al la Sudo, iĝinta tiel forta kerno de sia poezio, kiel la loko el kie originas la diskurso.

Carilda konsideras ke “publikigi versojn estas malkovri verojn kiuj eĉ ne suspektatas en nia sino, kaj alimaniere ili restintus nekonfesitaj... pro tio mi hezitis malfermi mian poezion. Sed subite io stranga kaj konfuza okazis: la paroloj, tremantaj, ekspreniris senpermeso al mia gorĝo, nepre, el la Sudo.”

En la verkaro de Carilda ankaŭ elstaras la poemaroj *Memoria de la fiebre* (Memoro de la febro, 1958), *Poemas de amor* (Amversoj, 1973), *La ceiba me dijo* (La ceibo al mi diris, 1979), *Desaparece el polvo* (Malaperas la polvo, 1983), *Se me ha perdido un hombre* (Viro mia estas perdita, 1993).

Bedaŭrinde, multaj recenzistoj taksas ŝian verkon “erotika” kaj eĉ “kliŝa”, spite al tio, ke ŝia verko kvazaŭ antaŭas tiun de siaj samtempuloj, pro la “malfermeco, realismo kaj konversacia tono” laŭ asertas aliaj recenzistoj. Ĉiuj konsentas, tamen, ke ŝia poezio plenumas socian funkcion, ĉar spegulas la sperton de virinoj nunaj kaj estontaj, kiuj povas malkovri en tiu riĉa verkaro “siajn proprajn sentojn kaj spertojn”.

La poemoj de Carilda estis tradukitaj al pluraj lingvoj kaj sendube ŝi estas unu el la plej elstaraj poetinoj hispanamerikaj, gajninto de gravaj literaturaj premioj, interalie, la Nacia Premio de Poezio en 1950; la premio de Hispanamerika Evento organizita de la Ateneo Amerika de Vaŝingtono okaze de la tricentjariĝo de la poetino Sor Juana Inés de la Cruz, plus la Nacia Premio de Literaturo en Kubo.

Carilda Oliver Labra estas ege konata pro ŝia fama ampoemo “Me desordenado” (Mi senordigas), kiu transformiĝis en popularan esprimon, uzata de

kubanoj en la ordinara vivo kaj ankaŭ en kanzonoj. Ni proponas al vi tradukon de la poemo “Patrino mia, kuŝanta en letero”:



Patrino mia, kuŝanta en letero  
Kaj en riproĉ’ malnova, ne trovebla  
Restu por ĉiam ĉi tie en la centro  
De la rozo kompleta, ne disigebla

Patrino mia, kuŝanta tiom for  
Satigita de neĝo kaj nebulo  
Atendu, ke mi venos, kaj sunigos vian memon  
Patrino mia, kuŝanta en letero.

Al mistero vi povas rendevui  
Kaj konsenti kun ombroj sorĉistinaj  
Povas esti, ke ŝtono apartiĝas  
Aŭ bluringajn okulojn vi forpelas  
Sed patrino, al filin’ forges’ ne indas  
Ne kuraĝu pri ĉio, mort’ ne eblas.



## Alvoko al amo: omaĝe al Marjorie Boulton

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Estis vaste informite al la E-komunumo, ke la 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino Marjorie Boulton. Ŝi naskiĝis la 7-an de majo 1924 kaj diplomiĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-1962), de la Internacia Ekzameno (1961-1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj E-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la E-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Degučí, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski. Ekster la E-movado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo. En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.

Marjorie Boulton estis ne nur alte respektata en la Esperanta mondo sed ankaŭ vaste amata. Oni ne povas pensi pri alia homo en Esperantujo kaj respektata kaj same amata. La respekto devenas ĉefe de la verkaro: elstara, ĉiam freŝa liriko, kiu foje humure, foje tragike, kunsente kaptas la homan sorton; teatraĵoj, kiuj, ĉu elegante verse, ĉu nature parole, prilumas la komedion, la tragedion de la vivo (memorindas, cetere, ke la plej riĉa dramo-kolekto en nia literaturo – *Virino ĉe la landlimo* – aperis en 1959). Ne forgesendas, cetere, la instruisto Marjorie Boulton, ĉiam populara kiel preleganto kaj organizanto de seminarioj kaj aliaj renkontiĝoj.

Do jen la respekto. Parte, jes, de la poemoj, la dramoj, la personaj renkontiĝoj dum kunvenoj kaj seminarioj, devenas ankaŭ la amo. Ŝia ĉefa karakterizaĵo estis humaneco. Esence, ŝi amis siajn kunhomojn: iliajn misojn, misiojn, suferojn, sopirojn, revojn, realojn. Kaj, ĉar ŝi amis, ŝi estis reciproke amata.

En aŭgusto de 2008, Paul Gubbins, verkis belajn vortojn por honori ŝin okaze de la 5-a Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj en Zargoje, kie li asertis ke sendube “ŝia verkaro postvivis ŝin kaj eternigos ŝian nomon en Esperantujo. Marjorie, estaĵo unika en Esperantujo. Unika, ĉar respektata kaj amata.” Jen fragmento de la poemo “Alvoko al amo”:

Ho, Amo, vivkomenco, vivosumo!  
Lumu por ni, per viaj gloroj mitaj,  
sed, kiel ĉiuj mitoj, veraj! Fumo

kaj nuboj kaŝas vin de ni, perditaj;  
sed brilu en la koroj, nin konsolu!  
Trapiku la nubaron per zenitaj


radioj, vivmistero! kaj parolu  
al ĉiuj kiuj solas, sen esperoj;  
diru al ili firme, “Ne plu solu”.

.../

inter la nuboj, jen la lumostrio,  
ĉiama lumo, ora kaj espera –  
ho, Amo, nia vera iluzio,

kiu kondukas nin al vero vera!

## EĤOJ EL LA KOMITATAJ FORUMOJ



**102-a Universala Kongreso de Esperanto**  
22-29 julio, Seulo, Korea Respubliko  
“Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo”  
1173 kongresanoj el 61 landoj



La Komitato de UEA okazigis 4 forumojn pri la 4 K de la Strategia Laborplano. Ni proponas skizon pri kelkaj el la ĉefaj temoj pridebatitaj de la ĉeestantaj komitatanoj. Kompletajn raportojn vi povas legi en la retejo de UEA.

**KAPABLIGO.** La forumo pridiskutis proponon de nova regularo pri la KER-ekzamenoj (Komuna Eŭropa Referenckadro pri Lingvoj), kiuj funkcias laŭ kontrakto inter UEA kaj Origó (la Hungara Ŝtata Ekzamencentro), kaj esprimis subtenon al tiu celo sed konstatis, ke por la aprobo de detala dokumento necesos ĝia reta prezento kaj voĉdonigo de la Komitato. **Buĝeto 2018:** La Komitato ricevos siatempe kaj nur informe tiun sub-buĝeton, kiam estas konata la fina stadio de la Asocia buĝeto por 2018, kiu fiksos nur la kvar grandajn sumojn por Movada Evoluigo, sen la detala analizo de unuopaj projektoj. Prioritatoj estas: inda fermo de la “Jaro de la lernanto”; pretigo de ambicia komuna universitata simpozio de UEA/ILEI; daŭrigo kaj evoluigo de la programo de Aktivula Maturigo (AMO).

**KOMUNUMO. Kongresoj:** Pliintensigi la komunuman flankon de la UK kaj plifortigi la percepton, ke temas pri evento apartenanta ne nur al la kongresanoj. **Jaro de E-Kulturo 2018:** Lanĉo de la jaro, cirkulero kun plano, celoj, indikoj al la LA pri kiel kontribui al ĝia sukceso; informkampanjoj kaj eventoj ligitaj al la ĉefaj aranĝoj okazontaj venontjare. **Kontinentaj komisionoj:** Subteno al la kvar kontinentaj komisionoj de UEA pri Regiona Agado (Afriko, Ameriko, Azio kaj Oceanio, Eŭropo), aparte por kunordigaj elspezoj; subteno al lokaj agadoj (inkluzive de la projekto pri Ĝemelaj Urboj kaj agado de E-Centroj), kaj regionaj kongresoj. **Scienca kaj Faka Agado:** Subteno de enketoj pri la membraro de la aliĝintaj FA de UEA, evidentiĝis kiel prioritata helpo al la plifortigo de la koncernaj asocioj en la nun konstruata nova retejo de UEA. Pri scienca agado, pludaŭras iniciatoj ligitaj al la

UK kiel la Internacia Kongresa Universitato; Scienca Kafejo kaj terminologia agado.

**KONSCIGO.** Pro foresto de la estrarano pri informado, oni koncentriĝis pri la publikaj rilatoj, tial listiĝis diversaj aspektoj: ĝi povas kontribui al aliaj agadoj de la asocio, ekzemple per faciligo de la vojo al subvencioj aŭ per la estigo de aliancoj

por difinitaj celoj; ĝi estas esence teama laboro, kiu postulas samtempe du specojn de kapabloj: profesiecan konon de la traktata temaro, kaj lerton pri homaj rilatoj. Ĝi plifortiĝas per speciala trejnado kaj postulas bonajn informmaterialojn, ofte plurlingvaj. Konkretaj atingoj, ekz. la eldono de *Unesko-Kuriero* (vd. p. 11) aŭ la funkciado de Amikumu, estas pli konvinkaj ol deklaroj kaj teoriaj argumentoj. Estiĝis pluraj sugestoj kaj rekomendoj.

**KUNORDIGO.** Okazis diskuto pri aldono al la Kongresa Regularo pri tio ke kunlabore inter CO kaj LKK, estu laŭeble nur unu retejo por la UK. La KKS, Clay Magalhães, bonvenigis la proponon, sed petis ke estu komprenemo pri ĝia efektiveco en la unua jaro. **Kotiz-sistemo:** Oni ricevis raporton verkitan de Mark Fettes pri la diskutoj pri la kotizsistemo en la lunda Forumo pri Membreco kaj Kotizoj. Oni aprobis, ke la Komitato akceptu la gvidajn principojn listigitajn en la raporto pri nova kotiz-sistemo, kaj komisiu la Estraron kaj la CO-on pretigi definitivan proponon pri ŝanĝo en la Ĝenerala Regularo (bazitan sur la propono ligita al la raporto), kune kun propono pri la referenca kotizo por 2018, ĝis la fino de oktobro 2017. **Pri buĝeto:** Oni traktis temojn pri kotizoj, oficistaro, aliaj oficejoj, movada evoluigo. Kelkaj diskutantoj indikis subtenon por la propono de Buller, ke la Estraro plu prilaboru la buĝeton post la UK, aldone pli detalajn informojn pri siaj planoj ĉe kelkaj eroj inkluzive de Oficistaro kaj Subvencioj. **Sekvaj kongreslandoj:** Finnlando (Lahtio, 2019) kaj Kanado (Montrealo, 2020). El la Forum-protokoloj resumis: MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

## LA 50-a KONGRESO EN BUSANO

**50-a Kongreso de ILEI**

15-22 julio, Busano, Korea Respubliko  
“Edukado al respekto plena turismo”

Aliĝis 196, partoprenis 170 kongresanoj el 21 landoj



**LA KONGRESO.** Alvenis 170; inter ili 20 unutaĝaj vizitantoj. La kialo estas la streĉita politika situacio tutmonda, kun du ŝtatestroj aparte ne antaŭvideblaj. Pro tio kelkaj personoj rezignis kaj aliaj ne ricevis vizon. Ni menciis aparte la klason de Neĝeta

el Ĉinio, grupon de 15 infanoj, por kiuj ni planis la infanan universitaton, kiu finfine ne okazis. Ok afrikanoj aliĝis kaj ne povis veni. Talenta junulo el Filipinoj same ne ricevis vizon. Finfine alvenis finna kolego, argentina junulo kaj vjetnama junulino.

La vojaĝo por la partoprenantoj kaj ĉefe por neazianoj estis longa kaj kosta. Pro tio ili volis malkovri la regionon kaj multe ekskursis. Tion oni bone povas kompreni. Ĉu pro la fakto, ke la temo estis turismo, la kongresanoj pli turismumis ol kongresumis...

La junulargastejo ARPINA, dek-etaĝa plej moderna konstruaĵo, ebligis komunan restadon tage kaj nokte. Tio estis tre favora situacio kaj stimulis bonan etoson. La ĉambroj estis tre komfortaj, eĉ luksaj. La uzo de la tegmenta etaĝo oka, faris de ni ok-ulojn. Tie estis eĉ surtegmenta teraso kun belega elvido al la maro; la kuraĝuloj iris tien kaj devis elteni la varmecon kaj humidecon. Ni havis 3-4 salonojn, larĝan koridoron por la libroservo, la akceptejo, la kaso kaj koridoraj babiladoj. Unu granda salono kun eblo dividiĝi en du ricevis la nomon de la forpasinta Lee Chong Yeong, fama korea esperantisto.

Du novaj programeroj aperis en tiu ĉi kongreso. La unua estas la Pedagogia Foiro. Laŭ la ĉeestantaj estraranoj ĝi estis sukcesa. Sen preleĝoj okazis kaj donis la okazon al certaj personoj prezenti instrumentaron, vortaron, novan lernolibron, la projekton "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano". La dua estas la Literatura Kafejo. En tiu programe-ro Mireille Grosjean prezentis du svisajn librojn, kiuj estis tradukitaj al Esperanto: *Sonoril' Urĉjo*, (de Chönz teksto kaj Carigiet bildoj) kies originalo estas en la romanĉa lingvo, kaj *La Birdo*, de Eveline Porter, kiu aperis en dulingva eldono: angla kaj Esperanto. La originalo estas en la franca. La dua Literatura Kafejo estis en la manoj de s-ro Rob Moerbeek; li prezentis verkon de Frederik van Eeden.

**KURSOJ KAJ PRELEĜOJ.** Kurso por komencantoj sub la gvido de Annie Grente. Kurso por progresantoj sub la gvido de Sylvain Lelarge. La Instruista Trejnado, grava parto de tia kongreso, estis en la lertaj manoj de Katalin Kovats. Ok personoj sukcese frekventis ĉiujn partojn de tiu lertigado kaj ricevos atestilon. La gvidantoj ricevu niajn elkorajn dankojn.

Preleĝoj okazis kaj konsistigis la paralelan programon, por tiuj kongresanoj, kiuj ne membras en la Komitato nek volas partopreni la supre menciitajn kursojn.

La Komitato kunsidis kaj atingis kvorumon danke al reta voĉdono antaŭa, kiu donis permeson al iuj komitatoj anstataŭi komitatanojn de aliaj sekcioj.

De la estraro ĉeestis la prezidanto, la vic-prezidanto kaj la vic-sekretario, nur 3 membroj, 3 virinoj. La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn, nome la forpasintan Paul Gubbins, el Britio kaj Hu Guozhu, el Ĉinio. La Komitato aprobis la agadraporton kaj la finanĉan raporton kaj farante tion malŝarĝigis la Estraron. Vigla diskuto okazis pri printado kaj sendo de nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) kaj *Juna Amiko* (JA). Gravaj decidoj okazis, kiuj devus kontentigi niajn membrojn kaj altiĝi la nombron de JA-abonantoj.

Nia ĉiujara evento fariĝas ĉiam pli riĉa, ĝia enhavo kreskas kaj variĝas. La nombro de partoprenantoj daŭre kreskas. Pro tio ni decidis en 2016 nomi ĝin **kongreso**. El tio fontas, ke partoprenanto ne povas esti en ĉiu salono kaj ĉion sekvi, aŭdi.

**EKSKURSOJ KAJ BANKEDO.** Pluraj ekskursoj okazis dum la semajno. Du tuttagaj okazis merkrede. Per buso 50 kongresanoj veturis al Gyeongju kaj al la antikva templo Bulguksa, kie ili havis la okazon restadi, mediti kaj manĝi en budhisma templo, kiu estas mondheredaĵo de Unesko.

Menciindas la elstara kontribuo de s-ro Monto, unu el la 11-membra LKK. Li organizis, ke en ĉiu programero aperis iom da korea muziko: dum la frandvespero, dum la malfermo, okaze de la Nacia Vespero, kompreneble, dum la lingva festivalo sur granda placo en la urbo. Danke al tio nia kongreso akiris viglecon kaj gajecon.

La bankedo okazis en fora restoracio, kiun la kongresanoj atingis per buso. Denove la busanoj fariĝis busanoj. Aŭdiĝis jena komento: la Bankedo estis la plej sukcesa, tio estas abunda kaj bongusta, belaspekta kaj originala, kompare kun multaj aliaj dumkongresaj bankedoj. Kompletigis ĝin laŭlegado de etaj amuzaj tekstoj kaj poemoj kaj grupa ludado pri ĝeneralaj konoj.

Vendrede vespere ripetiĝis tre detala kaj interesa prezo de Iberio en rilato kun niaj venontjaraj kongresoj. Prelegis Duncan Charters, Rubén Fernández Ascensión kaj Mireille Grosjean.

Substrekindas, ke kaj la Estraro kaj la LKK laboras volontule. Kiam partoprenantoj venas al ili kun postuloj, tio estas iom ĝena afero. La organizantoj ofertas servojn kaj helpon, sed postuli oni povas fari

ĉe salajrita persono, ni tute ne estas en tia situacio. Kongresanoj en nia movado devas kompreni tion.

Kiam ni parolas pri instruado, ni pensas pri transdono de konoj kaj de kapabloj, klarigoj, ekzercoj...

Tra la "Jaro de la lernanto" ILEI klopodis montri la gravecon de respondeca lernado de la studento kaj nova akompana rolo de la instruisto.

En Busano ni aŭdis la vortojn "instigo" kaj "emocioj". La kunvivado de instruisto kaj de studentoj-lernantoj ankaŭ havas tiajn flankojn, al kiuj ni devas meti nian atenton. Instigo estas pli delikata nocio ol sugesto aŭ propono, sen paroli pri peto, postulo, devigo. Instigi estas montri per siaj propraj agoj, kio povas efiki kiel sugesto al aliaj. Povas esti flustrado de ideoj, faktoj, konstatoj. Emocioj ludas rolon en la rilato inter la instruisto kaj la lernanto; oni ŝatas la personecon aŭ ne ŝatas, oni ĝojas aŭdante amuzajn faktojn, la sindona instruado post bona preparado, adekvata komunikado en respektoplena etoso vekas admiron kaj pozitivan senton.

Mi ne aŭdis ian plendon. Mi mem vidis kelkajn paneetojn. Certe oni povas altigi la nivelon de la organizado. Sed ĝenerale ĉio disvolviĝis bone kaj kontentige. Por multaj kongresanoj tiu sperto esti en internacia renkontiĝo estis la unua. Ili esprimis sin tre pozitive pri tiu grava travivaĵo.

Resumis el raporto de MIREILLE GROSJEAN (CH):  
ALBERTO F. CALIENES

## ALIA MONDO EBLAS!



**90-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**  
29 julio-5 aŭgusto, Gimpo/Seulo, Korea Respubliko  
"Demokratio en nuntempa mondo"  
Partoprenis: 105 kongresanoj el 23 landoj



Ĉi-jare la unuan fojon, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kongresis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo, 105 kamaradoj el 23 landoj ĝuis la 90-an SAT-Kongreson en urbeto Gimpo, apud Seulo, proksime de la bordo ĉe la Flava Maro.

Koreoj bonvenigis nin per rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo Yakam, kie okazis la antaŭviditaj programeroj kaj je dispono de la kongresanoj estis senpaga aliŝo al ĝiaj kuracaj banakvojoj, kion pluraj el ni profitis ĝissate. Ĉe la alveno, post registriĝo

kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj povis elekti (en sia granda) verdan T-ĉemizon kun surskribo: "SAT – Tutmonda Solidareco".

**LA TEMO.** La kongresa temo estis "Demokratio en nuntempa mondo". La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro, en pli granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate, dum la Interkona Vespero, prezentiĝis du muzikbandoj de la "Paca agado sur strato".



Alberto F. Calienes prelegas pri Kubo dum la 90-a SAT-Kongreso (Gimpo/Seulo, Korea Respubliko).

**PROGRAMO.** Dum la malfermo, Vinko Markovo informis pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de la Plenumkomitato (PK) kaj la Organiza Kongresa Komitato (OKK) sekvis salutoj de kelkaj organizaĵoj: Rob Moerbeek (UEA), Dieter Rooke (IKEK), Franciska Tubale (Radio 3ZZZ), Liba Gabalda (IFEF). Ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano “Se ni kune sonĝas kaj praktikas, alia mondo eblas!”. Tuj poste sekvis prelego pri la “Kandelluma Revolucio”, kiu fine forigis la prezidantaron de Sud-Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: “\*Multitudoj kaj absoluta demokratio”. Interesan sciencfikcian prognozon pri “Guglo kaj ĝia pasporto” prezentis Hiongun Kim (KR), kiu kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo “Espera Mondo”. Sonis diversaj, al kelkaj el ni, nekonataj instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton “Ariari”, muziki kaj danci kun la bele vestitaj geaktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn.

Lunde komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jar-raportoj. Okazis diversaj diskutoj, prezento de la Konferenco pri Unuiĝo de la du Koreaj Ŝtatoj okazinta dum UK, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj: liberecana, vegetarana, komunista, sennaciista, verdula, liberpensula.

Jen kelkaj el la prelegoj: “Nuklea akcidento en Fukuŝima” (Hori Jasuo, JP); “Antropologio, kartografio kaj koloniismo” (Guilherme Fians, BR); “Enrigardon al la korea literaturo” (Rob Moerbeek, NL); “Koreaj lingvo kaj historio” (Ho Song, KR); “Esperanto kaj klasikaj lingvoj” (Saioa Escobar, ES); “La rusa revolucio 1917” (Dieter Rooke, CH); “Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin” (Maria Butan, RO); “Mia domo en Kreto” (Annie Grente, NL); “Veganismo” (Paŭlino Gaborit, FR); “La memoro de E-movado” – pri Eduardo Vivancos, nun 97-jaraĝa – (Xavi Alcalde, ES); “Notoj pri monda kapitalismo” (Miyazawa Naoto, JP); “Ĉina Tajpeo por Tajvano” (Abengo, TW); “Fak-laboro en Fejsbuko” (Neil Blonstein, US); “Kubo, nuntempo kaj perspektivoj” – kaj prezento de la 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto – (Alberto F. Calienes, CU); “Pri la situacio en Demokratia Respubliko Kongo (Alfonse Waseka, CD).

Tradukan laborgrupon gvidis Annie Grente. Ege bela ateliero montriĝis pri kreado de mandaloj per sablo. Hori Jasuo muzikis per diversaj etaj muziki-

loj akiritaj dum siaj multnombraj vojaĝoj. Ni ankaŭ povis ekscii pri la Eldona Fako Kooperativa.

Dum kulturaj vesperoj okazis muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. La kongresanoj ĝuis belan koncerton de la litova ensemblo “Sepa kaj Asorti” kaj teatraĵon “La malfermilo” kiun prezentis Saŝa Pilipoviĉ kaj Franciska Toubale. Spektinda estis ankaŭ aŭkcio de esperantaĵoj iniciatita de Tahira Masako (Masakato), kiu kolektis pli ol 300 eŭrojn por SAT. Dum la distra vespero ni ĝuis korean operon “Ariari” de la familio Lee Eunwoo. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

**EKSKURSOJ.** Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj vindindaĵoj: al Bujeo, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon; alia, ne malpli interesa, montris la “Pacan observejon”, en insulo Ganghwa, plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝi. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon oni ellaboris kaj prezentis Gvidrezolucion kaj Deklaron. Vespere okazis la fermo kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de OKK. Saŝa Pilipoviĉ prezentis la urbon Kragujevac (Serbio), kie okazos la 91-a SAT-kongreso (5-12 aŭgusto 2018); kaj ricevis de OKK la flagon.

La ĉi-jara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra, kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konferencioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.

Resumis el raporto de LIBA GABALDA (FR):  
ALBERTO F. CALIENES

## TEJO EN AFRIKO!



**73-a Internacia Junulara Kongreso**  
5-12 aŭgusto, Aneho, Togolando  
“Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj”  
Partoprenis: 110 kongresanoj el 27 landoj

La komitato de TEJO elektis novan estraron por la venonta jaro. La elekta komisiono (EK) rekomendis, ke la komitato elektu naŭmembran estraron, por eviti ke malmultaj estraranoj havu tro da taskoj. Laŭ la elekta komisiono en la lasta estraro la estraranoj estis “superŝarĝitaj”. La komitato ja grandigis la estraron iom, sed ne tiom – la nova estraro havas sep

anojn, du pli ol la antaŭa. Kiel prezidanton la EK rekomendis Enric Baltasar (ES), la antaŭan estraron pri merkato, kunlaborado pri informado kun UEA kaj landa agado. Tiun rekomendon la komitato sekvis. Por la posteno de kasisto la komitato, same laŭ la rekomendo de la elekta komisiono,



La Komitato de TEJO dum sesioj en la IJK en Aneho, Togolando.

elektis Bui Mung (VT). Al la posteno de ĝenerala sekretario ne estis elektita Carlos Pesquera, kiel rekomendis la EK, sed Hoan Tran (Ĝojo) (VT).

Pesquera kaj la antaŭa ĝenerala sekretario Arina Osipova, kiun la EK rekomendis por la posteno de estrarano pri kongresoj, tute ne estis elektitaj. Kiel unua vicprezidanto estis elektita Konstanze (Tuŝka) Schönfeld (DE). Ŝin la EK rekomendis kiel estraron pri subvencioj. Kiel dua vicprezidanto estis elektita Francesco Maurelli (IT). Li, laŭ la dokumentoj de la EK, loĝas en Germanio kaj estis



Kvar el la novaj estraranoj de TEJO ĉeestis en la IJK en Aneho.

rekomendita por la posteno de estrarano kun respondecado pri eksteraj rilatoj kaj rilatoj kun UEA. Kiel ordinara estrarano estis elektita Charlotte Scherping Larsson (DE) kaj Doniben Jiménez Jaramillo (CO). Kvar el la sep novaj estraranoj de TEJO ĉeestis en la IJK en Aneho. Neniu afrikano kandidatis al la estraro, kiu estis elektita dum la unua afrika IJK. La oficperiodo de la estraranoj de TEJO nun estas nur unu jaro. La decido pri la duonigo de la oficperiodo de la estraro estis farita en aprilo, dum la IJF, sen antaŭa diskuto. La propono estis sendita al la komitata listo unu tagon antaŭ la komitata kunsido, kaj la decido poste ne estis publike diskonigita. Resumita el raporto el *Libera Folio*: [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org). (Fotoj: TEJO.)



# La 84-a itala kongreso kaj ĝia UK-eca etoso

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La ĉarmo de landaj kongresoj de Esperanto ĉiam estas la okazo de proksime konatiĝi kun konkreta lando en iom pli intima etoso kompare kun UK-oj. Tial reveni al la itala kongreso de post multaj jaroj estis ege interesa sperto.

Mia unua landa kongreso estis ĝuste itala en la jaro 1989 en la norda kaj belega urbo Bergamo. El ĝi mi memoris la plurajn ekskursajn programerojn, la meson kaj la eblecon konatiĝi kun esperantistoj el aliaj landoj.

La nuna kongreso, la 84-a, okazinta en Policoro, en la regiono Basilicata, sude de Italio, estis tute alia sperto, ĉar mi estas ne nur pli aĝa kaj konscia esperantisto, sed ankaŭ ĉar la itala movado sukcesis prezenti eventon pli profesie organizitan kaj ili kapablis transdoni buntan kongreson, kun diversaj samtempaj programeroj kiel seminarioj A kaj B, paralelaj kaj gviditaj de spertaj kaj konataj esperantistoj, nome Osmo Buller kaj Lu Wunsch-Rolshoven en la fakoj informado, komunikado kaj publikaj rilatoj. La kongresa temo estis “Kulturo kaj Komunikado en Eŭropo”.

Okazis diversaj kursoj, libreprezentoj kun kelkaj aŭtoroj, kiel Carlo Minaja kaj Ulrichs Lins, kiuj prezentis la verkojn *Vivo de Homo-Giuseppe Ungaretti*, *Lukana Antologio* kaj *La danĝera lingvo*, respektive; same estis prezentitaj *Poezia Antologio* de Nazim Hikmet kaj *La infana raso* en dulingva eldono, flanke de Renato Corsetti kaj Osmo Buller; tre ŝatata programero estis la kant-ateliero de la nederlanda duopo Kajto plus vigla kaj gaja koncerto; tre aktuala kaj simbola teatraĵo kaj kantvespero ankaŭ plenigis la artajn programojn. Ne mankis meso. Kaj sendube la ekskursaj programoj estis tre abunda per oferto de pluraj duon- kaj tut-tagaj ekskursoj plus la tuttagaj merkredaj ekskursoj.

Entute ĉeestis 198 kongresanoj el 23 landoj, el Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Afriko. Aparte elstara estis la informa flanko kiu komenciĝis per gazetara konferenco kun lokaj ĵurnalistoj kaj aŭtoritatoj de la urbo, kiuj ĉeestis ankaŭ la inaŭguran ceremonion kaj akompanis la evoluon de la kongreso. Reeĥo en la gazetaro estis ampleksa kaj same televid-intervjuoj okazis. Tio konfirmas la fakton ke en malgrandaj urboj la lokaj aŭtoritatoj kaj gazetaro tre atentis kaj bonvenigas niajn kongresojn. Kiel jam tradicias dum la lastaj kongresoj ekde 2008, la kongresanoj havis la okazon aĉeti kaj sendi du poŝtkartojn specife preparitajn por la kongreso kun speciala poŝta stampo.

La kongresejo estis la hotelo-rezidejo Heraclea, situanta ĉe la marborda regiono de Policoro kun bela kaj multuza salono Zamenhof plus aliaj salonoj kaj ejoj por la aliaj programeroj.

Spite al malfruoj de kelkaj programeroj kaj loĝigaj problemoj pro lastmomentaj hotelpaneoj,



Sur la podio, Emanuele Regano. Ĉe la prezidtablo Michela Lipari, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, kaj reprezentantoj de la lokaj aŭtoritatoj. Sube, la riĉa Libroservo, dum la kongresaj tagoj. Fotoj: Maritza Gutiérrez González.

tuj antaŭ la kongresa malfermo, kiuj estis rapide solvitaj, la rezultoj estis pli ol pozitivaj kaj indas rekoni la konstantan zorgon de la LKK prezidita de Michela Lipari kun sia teamo.

Kaj por konfirmi la UK-ecan etoson de la tuta kongreso, je la fino oni prezentis la venontjaran kongreson per filmo kaj unuajn informojn pri ĝi, temas pri la 85-a Itala Kongreso okazonta en Respubliko San Marino. La koncernan broŝuron ricevis ĉiu kongresano en la bela kongresa dorsosako kun invito al San Marino.

Kiel esprimite de Marcello Pittella, prezidanto de la regiono Basilicata en sia bonveniga saluto al

la kongresanoj: “Esperanto venas de la vorto espero.

Jen ni rigardas al nia nuntempo kaj al nia estonto esperoplenaj, sciante ke ankoraŭ multo farendas; sed sciante ankaŭ, ke iniciatoj kiel tiu ĉi povas multe helpi por daŭre stari sur solidaj bazoj kaj malferme rigardi al la mondo, nepra kondiĉo por rigardo al la estonto eĉ pli fidoplene”.

Jen la mesaĝo kiun ni, kongresanoj, kunportas en nia koro, ĉar ni estas parto de komunumo kiu konstante proponas al la mondo tiun ĉi iniciaton forme de kongresoj, agadoj, amikeco, solidareco, animo kaj espero.



## Mia rusa sperto

ALINA DOLORES ZUAZNABAL HIMELY



*Promenado en la Ruĝa Placo de Moskvo, kun la impona Kremlo, estis inter la plej ŝatataj spertoj dum la restado en Rusio.*

Rezulte de mia interŝanĝo kun rusaj esperantistoj, de la 30-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto, mi havis eblecon partopreni en Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET), aranĝo ĉi-foje dediĉita al 140-jariĝo de Ivan Ŝirjaev – esperantisto, verkisto, pastro; kun ĉeftemo: “Idea, filozofia kaj religia fono de Esperanto”.

Dum la tagoj en Moskvo, la Ruĝa Placo kaj Kremlo montriĝis plenumita revo, sed ankaŭ vojaĝo tra la rivero Moskvo de kie oni povas rigardi tre belajn pejzaĝojn kaj inter ili, la majestan statuon de Petro la Unua. Menciendas vizito al la cirka spektaklo, promenado en la fama Lomonosova Universitato kaj en la parko de la Bolŝoja Teatro.

Al la kampadejo “Strangula Korto” (Чудной двор), apud urbeto Poŝehonjo ni veturis buse ĉar tie okazis, de la 2-a ĝis 9-a de aŭgusto de 2017, la Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET). Belega loko apud rivero, ankaŭ kun komfortaj domoj agrablaj kolegoj kaj temperaturo.

La programo de RET estis tute interesa kaj diversa. Ĝi permesis al ni, riĉigi niajn konojn precipe pri Esperanto pere de kursoj, prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj: rusaj simboloj, rusaj fabeloj; aŭ konversacia rondo, kiu ebligas, pere de agrablaj situacioj akiri pli ampleksan vortostokon; la laboro de tradukistoj kaj verkistoj ne povis manki ĉar tio garantias la daŭrigojn kaj reklamon de nia movado, kunligita al Libroservo.

La Artan Vesperon agrabligis deklamado de poemoj, legado de rakontetoj kaj la kanto de la grupo “Ekvinokso” kaj Mikaelo Povorin; ankaŭ

mi prezentis temojn pri Esperanto en Kubo, pri Cienfuegos kaj pri Rumbó, “Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro” kaj provis instrui al ili danci ĝin.

La programo inkluzivis ankaŭ ekskursojn al Poŝehonjo, kie oni festis fondon de la urbeto kaj prezentis tradiciajn dancojn, manĝaĵojn; infanludojn ktp. Ni havis ĉiĉeroninon kiu gvidis nin tra la urbeto kaj rakontis pri ĝia historio, inter alie, ni vizitis preĝejon kaj Ursan Muzeon. Kurioza datumo: la ursoj estas simbolo de tiu regiono.

Alia ekskurso de la programo estis en Kukobojo, kie ni renkontiĝis kun Baba Jaga kiu havas sorĉan dometon kun gamboj de kokinoj kaj ni eĉ flugis per balailo.

Kiam oni iras tra la historio oni kreas kaj eliminigas barojn, ne ekzistas distanco. Pro tio kiam ni ekskursis al Ribinsk buse kaj poste al Tutajev per traktoro, ĉiuj komentis, ĝuis kaj ridegis kaŭze de tiu tre interesa vojaĝo.

Post RET unuj el ni revenis hejmen kaj kiel ĉiam adiaŭo estas malfacila kaj malgajigas homojn. Aliaj daŭrigis al Muzeo-Vilaĝo Bjatskoje. Ĝi aspektas kvazaŭ vi eniras alian epokon kaj samtempe al infanrakonto. Jaroslavo kaj Kastromao estis aliaj ĉarmaj urboj kiujn ni vizitis.

Je la fino mi volas multe danki al tiuj kiuj ebligis mian rusan aventuron: Svetlana, Prezidantino de Rusia Esperantista Unio (REU) kaj Mikaelo (Ĝenerala Sekretario de REU), ankaŭ mi gratulas ilin kaj ĉiujn kunlaborantojn pro la tre bona E-agado.

Ĝis baldaŭ!

## Tre sukcesa kursfina aranĝo en Santiago de Cuba

JULIO CÉSAR TAMAYO SALAS

Kun ega jubilo, la kursfinintoj de la pasinta E-instruperiodo ricevis siajn atestilojn, kiuj certigas la rezultojn de la ekzameno. La Estraro de la Provinca Filio en Santiago de Cuba organizis la 3-an de septembro solenan kaj kulturen aranĝon en la tre populara “Drinkejo de Dolores”, nuntempe restoracio, restaŭrita al ĝia origina stato.


Partoprenis en la aranĝo 20 personoj: 14 geesperantistoj kaj 6 familianoj, inter ili du infanoj. La solenaĵo komenciĝis per parolado de Gonzalo Collantes García, prezidanto de la Kuba ILEI-Sekcio, kiu alparolis la diplomitojn pri la graveco partopreni kurson por progresantoj, kaj pri la aktiva restado en la Asocio. Sekve, Guillermo Navarro Toledano, prezidanto de la Provinca Filio, diskonis la atestilojn al la diplomitoj kaj parolis pri la 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, okazonta februare de 2018, en Havano.

Dum la ĉeestantoj tagmanĝis kaj tostis pro la jubilo esti trapasintaj la bazan kurson; oni aŭskultis kaj dancadis laŭ la agrabla kaj bonetosa melodimuziko de la loka kaj tradicia muzikgrupo Sonny Band, kiu interesiĝis pri Esperanto, kaj pri la laboritaj tradiciaj kubaj kantoj, tradukitaj al Esperanto. Je la fino de la sukcesa aranĝo, nome de la Estraro kaj de la ĉeestantoj, ni gratulis kaj dankegis la kelnerojn de la restoracio pro la profesiaj servoj.



*Esperantistoj de Santiago de Cuba kune tagmanĝis kaj festis en la Kursfina Aranĝo dum kiu oni diskonis atestilojn al la diplomitoj. Sur la foto aperas ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ la personaro de la restoracio “Drinkejo de Dolores”, kiuj bone priservis ĉiujn kaj ankaŭ interesiĝis pri la Internacia Lingvo. Foto: Luis Alonso.*





## PARALELA UNIVERSO EN KUBO

Paralela Universo jam fariĝas tradicia aranĝo de KEA. La 19-an de aŭgusto ĝi okazis per samtempa aranĝo en 6 provincoj kun la subteno de KEA, kiu subvenciiis al lokuloj unuhoran retkonekton.

Tiu aranĝo okazis unuafoje en 2016 en Nordameriko sed ĉi jare etendiĝis al la tuta kontinento kaj eĉ al kelkaj urboj en Eŭropo, tiel ke la defio por la venonta jaro estas tutmondiĝi ĝin.

La ideo gajnis multajn adeptojn kaj ŝatantojn pro la fakto ke ĝi okazas samtempe en pluraj lokoj, kombinas teknologion, reton kaj tradician ĉeestatan aranĝon tiel ke oni povas elekti inter multaj eblecoj por partopreni kaj rete kontakti aliajn esperantistojn aŭ grupojn, kiuj partoprenas en aliaj urboj / landoj. Multaj fotoj kaj filmetoj aperis en la oficiala grupo de PU ĉe Facebook (<https://www.facebook.com/groups/691599730978382/?ref=bookmarks>), en la oficiala retpaĝo de la projekto [www.paralelauniverso.com](http://www.paralelauniverso.com) kaj ĉie en la reto.

Ni kaptis la okazon por videbligi la kuban E-movadon kaj ĝian agadon en la tuta lando; ni ankaŭ vaste informis pri la 9-a TAKE okazonta februare de 2018 en Kubo. Pluraj eksterlandaj amikoj reagis al niaj komentoj kaj kundividis multajn el niaj publikigaĵoj.

Kiel plibonigenda ero estis komento de Jed Metzger pri la malaktivado ĉe Telegram (poŝtelefona aplikaĵo, “apo” kiu ebligas, babili, sendi fotojn kaj tuj-mesaĝi), sed li tre laŭdis la kvanton de aranĝoj, ilian varion kaj bonan organizon.

En Kubo ĉi-jare okazis 6 paralelaj aranĝoj, kelkaj el ili grandaj, kelkaj malgrandaj: Pinar del Río, Havano, Santa Clara, Santo Domingo (foto 3), Granma, Santiago de Cuba (foto 2) kaj Guantánamo (foto 1). Internaciaj statistikoj kaj raporto de la ĉeforganizantoj aperos baldaŭ en la revuo *Esperanto*.

La aranĝo okazos ĉiujare ĉirkaŭ la sama dato kun subteno de Kanada Esperanto-Asocio.

Ni invitas vin organizi kaj/aŭ partopreni en la venontjara Paralela Universo. Se vi interesiĝas, aliĝu al la diskutgrupo en Google Groups (<https://groups.google.com/d/forum/paralela-universo-2017>) kaj al la Fejsbuka paĝo.

JAVIER RAMOS NISTAL

## Esperantista radiostacio funkcias ĉe la Ruĝa Kruco okaze de uragano Irma

En reprezento de la Grupo Esperanto-Ruĝa Kruco kaj de la Radioklubo Esperanto, Javier Ramos Nistal (CM2MM) kaj Fráncel Briel Gil (CL7FB), – esperantistoj, radioamatoroj kaj ruĝkruccanoj – aktivigis la stabejon por urĝoj okaze de katastrofoj ĉi-foje en preparo por eblaj damaĝoj okazontaj dum la uragano. Ili muntis la kluban radiostacion CO9BNN en la Provinca Sidejo de la Ruĝa Kruco en Havano, kiu funkcias antaŭ, dum kaj post la trapaso de Irma.

Kvankam la vetero estis tre malbona, fortaj ventoj, pluvego, inundoj en la Havana moleo ktp. Feliĉe ni sukcesis plentempe havi la komunikilojn aktivaj eĉ dum la plej malfacilaj momentoj por samtempe informi al la direktorganoj de la lando, la sukuristojn de la Ruĝa Kruco, aliajn provincojn, la Havanan reton de radioamatoroj, la Civitanan Defendon kaj ĝian radiostacion CO9DCN pri ĉio okazanta dum la uragano. Esperantistoj kontribuis eviti mortojn dum la uragano.

FRÁNCEL BRIEL GIL

Foto dekstre: Javier Ramos Nistal kaj Fráncel Briel Gil dum la funkciigo de la radiostacio CO9BNN en la Provinca Sidejo de la Ruĝa Kruco en Havano. Foto: Arkivo de KLERa.



# La kunsidoj de la Komitato (II, fino)

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

En la unua parto de tiu ĉi artikolo, post pluraj konsideroj rilate la historion de KEA, mi difinis ke la unuaj sep kunsidoj de nia Komitato okazis jene:

- 1-a:** 19-20 novembro 1983, Nacia Kapitulo, Havano.
- 2-a:** 8-9 decembro 1984, Nacia Kapitulo, Havano.
- 3-a:** 13-15 decembro 1985, Nacia Kapitulo, Havano.
- 4-a:** 14 junio 1986, Nacia Kapitulo, Havano.
- 5-a:** 6-7 decembro 1986, Sportlernejo Manuel Fajardo, Santa Clara.
- 6-a:** 3 decembro 1987, Stadiono Latinoamericano, Havano.
- 7-a:** 8-19 januaro 1989, Hotelo Plaza, Camagüey.

Je la fino de tiu unua parto, mi diris: "La postaj kunsidoj de la Komitato havas siajn respektivajn numerojn, laŭregistrite sur la komitata flago. Pri ili, mi skribos en la dua parto de tiu ĉi artikolo, publikigota en la venonta eldono de *esperanto.cu*, kaj jen, la aliaj 26 kunsidoj de la Komitato de KEA, al kiuj mi aldonas komentojn, nur kiam tiuj estas vere gravaj por la historio de Esperanto en Kubo.

- 8-a** 25-27 januaro 1991, Hotelo de la Unuiĝo de Junaj Komunistoj, Havano. Ĝi estis prezidita de Julián Hernández Angulo, anstataŭanta de Jesús Castillo Jiménez, kiu rezignis je sia posteno. Oni elektas Hernández Angulo (4-a prezidanto de KEA) por gvidi la Asocion en la sekvanta oficperiodo.
- 9-a** 25-26 januaro 1992, Provinca Instrua Centro de la Ministerio pri Konstruado, Bayamo, Granma. Oni aprobas la novan Statuton de la Asocio.
- 10-a** 30-31 januaro 1993, Provinca Biblioteko Elvira Cape, Santiago de Cuba. Oni elektas al Hernández Angulo kiel prezidanton, laŭ la aprobita Statuto dum la antaŭa kunsido de la Komitato. De tiam, la Estraro ne plu konsistas je 10 membroj, sed je sep.
- 11-a** 29-30 januaro 1994, Sporta Hotelo, Sancti Spíritus.
- 12-a** 28-29 januaro 1995, Municipa Kulturdomo, Camagüey.
- 13-a** 5-6 marto 1996, Muzeo pri Sciencoj Carlos J. Finlay, Havano. Hernández Angulo reelektiĝas prezidanto por dua periodo, laŭstatute. Oni elektas du novajn Honorajn Membrojn de KEA: Rosa Castañeda Guerrero (Sancti Spíritus) kaj Socorro Castro Palomino (Manzanillo, Granma).
- 14-a** 24-25 de januaro 1997, Hotelo Guantánamo, Guantánamo.
- 15-a** 6-7 februaro 1998, Hotelo Sierra Maestra, Bayamo, Granma. Unuafoje, tri honoraj membroj partoprenas la laborsesiojn de la Komitato: Pedro

Pablo Lamas Díaz, Rosa Castañeda Guerrero kaj Socorro Castro Acosta. (vd. *foton sube*).

- 16-a** 10-11 marto 1999, Hotelo Lincoln, Havano. Laŭstatute, elektiĝas nova prezidanto Maritza Gutiérrez González (la 5-a en la KEA-historio).
- 17-a** 28-29 januaro 2000, Villa Trópico, Santiago de Cuba. La laborsesioj komenciĝis per omaĝo de la komitatanoj al la Nacia Heroo José Martí, en la Tombejo Santa Ifigenia (vd. *foton sube*).
- 18-a** 26-28 januaro 2001, Hotelo Santa Clara Libre, Santa Clara, Villa Clara.
- 19-a** 25-26 januaro 2002, Municipa Sidejo de Kuba Virina Federacio (FMC), 10 de Octubre, Havano. Elektiĝas prezidanto Hernández Angulo.
- Eksterordinara Kunsido:** 6 marto 2002, Hotelo Lincoln, Havano. La komitato sesiiis por elekti novan prezidanton ĉar Hernández Angulo rezignis pro laboraj kialoj. Maritza Gutiérrez González, kiu tiam ankaŭ prezidis la Preparkomiton de la 4-a Kongreso de KEA, elektiĝas prezidanto.
- 20-a** 24-25 januaro 2003, Hotelo Plaza, Sancti Spíritus.
- 21-a** 23-24 januaro 2004, Municipa Sidejo de Ministerio pri Edukado, 10 de Octubre, Havano.
- 22-a** 14-16 januaro 2005, Nacia Sidejo de KEA, Havano. Elektiĝas prezidanto Hernández Angulo.
- 23-a** 27-28 januaro 2006, Nacia Sidejo de KEA, Havano.
- 24-a** 26-27 januaro 2007, Nacia Sidejo de KEA, Havano.
- 25-a** 25-26 januaro 2008, Nacia Sidejo de KEA, Havano. Hernández Angulo reelektiĝas prezidanto por dua periodo.
- 26-a** 6-7 marto 2009, Nacia Sidejo de KEA, Havano.
- 27-a** 28-29 januaro 2011, Nacia Sidejo de KEA, Havano. Elektiĝas prezidanto Alberto Fernández-Calienes Barrios (la 6-a en la KEA-historio).
- 28-a** 15-16 februaro 2012, Kampadejo Río Seibabo, Manicaragua, Villa Clara. Ĝi sesiiis kadre de la 1-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo).
- 29-a** 14-15 marto 2013, Kampadejo Escaleras de Jaruco, Jaruco, Mayabeque, okaze de la 2-a KERo.
- 30-a** 13-14 marto 2014, Kampadejo Dos Hermanas, Viñales, Pinar del Río, kadre de la 3-a KERo. Fernández-Calienes reelektiĝas por dua periodo.
- 31-a** 30-31 januaro 2015, Nacia Sidejo de KEA, Havano. (vd. *foton sur la apuda paĝo*).
- Eksterordinara Komitatokunsido:** 18 marto 2015, Kampadejo Río Seibabo, Manicaragua, Villa Clara, okaze de la 4-a KERo. La Komitato sesiiis por analizi kaj aprobi la regularojn de Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO) kaj de la Kuba ILEI-Sekcio.



Sidantaj, de maldekstre, Honoraj Membroj de KEA Pedro Pablo Lamas Díaz (Ciego de Ávila, 1929-2014), Rosa Castañeda Guerrero (Sancti Spíritus), kaj Socorro Castro Acosta (Granma, 1916-2008). Starantaj, Maritza Gutiérrez González kaj Rodolfo Cabrera Espinosa. Foto: Juan Ramón Rodríguez Gómez.



Antaŭ la okazigo de la 17-a Komitatokunsido, komitatanoj de KEA metas florkronon ĉe la monumento al la Nacia Heroo José Martí en la Tombejo Santa Ifigenia, de Santiago de Cuba. De maldekstre, i.a. Julio César Tamayo Salas, Maritza Gutiérrez González kaj Raúl Sánchez Guillarte. Foto: Arkivo de KEA.



Grupa foto post la okazigo de la 31-a Komitatkunsido en la Nacia Sidejo de KEA en Havano. Sur la foto, krom la komitatanoj de KEA, gejunuloj partoprenintaj la 1-an Komitatkunsidon de Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO). Foto: Arkivo de KEA.



Maritza Gutiérrez González alparolas la ĉeestantojn dum la akcepto por Membroj-Subtenantoj okazinta tuj post la fermo de la 33-a Komitatkunsido, kadre de la 6-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo), Río Seibabo, Manicaragua, Villa Clara, marte de 2017. Foto: Arkivo de KEA.

**Eksterordinara Komitatkunsido:** 21 novembro 2015, Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruĝinĝenieroj de Kubo (UNAICC, Havano), kadre de la 6-a Kongreso de KEA. La Komitato sesiiis por pridiskuti kaj aprobi proponon de kvin novaj Honoraj Membroj: Julio Martínez Fiallo, Francisco Briel de Cañas, Andrés Rodríguez González, Fernando Paredes Elósegui kaj Jesús Castillo Jiménez (*post mortem*).  
**32-a** 16 marto 2016, Kampadejo Arcoíris, Santa Clara, Villa Clara, kadre de la 5-a KERo.

**Eksterordinara Komitatkunsido:** 29 oktobro 2016, Nacia Sidejo de KEA, Havano. Laborsesioj dum kiuj oni aŭskultis opiniojn de komitatanoj kaj ne komitatanoj pri prezentitaj demandoj kaj preparolis kaj aliflanke ankaŭ analizis diversajn aferojn en rilato kun la interna funkciado de la Asocio.  
**33-a** 16 marto 2017, Kampadejo Río Seibabo, Manicaragua, Villa Clara, okaze de la 6-a KERo. Maritza Gutiérrez González elektiĝas plian fojon prezidanto de KEA por la madato 2017-2020 (*vd. foton supre*).



### Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio Daimi Doval Delsa, Havano

★ Daimi Doval Delsa naskiĝis la 23-an de junio 1974 en provinco Camagüey, Kubo, kie ŝi esperantistiĝis en 1993. ★ Daimi tre vige aktivas en la Esperanto-movado de Kubo. ★ Ŝi jam partoprenis multajn naciajn eventojn de Esperanto, inter kiuj kongresoj, festivaloj kaj renkontiĝoj. ★ En 2004 ŝi partoprenis la 6-an TAKE en Havano, Kubo. ★ Ŝi verkas kanzonojn kaj muzikigas ilin. ★ Ŝi ĉarme kantas kadre de niaj aranĝoj. ★ Daimi ankaŭ partoprenis la 95-an Universalan Kongreson de Esperanto en Havano, 2010. ★ En la 100-a Universala Kongreso de Esperanto (Lillo, Francio, 2015), ŝi prezentis en Esperanto 4 kanzonojn, du el ili verkitaĵoj kaj muzikigitaj de ŝi mem. ★ Ŝi sukcesis la elementan ekzamenon de KEA kaj planas vige partopreni la 9-an TAKE en Havano, februare de 2018.

#### INTERNACIAJ EVENTOJ 2018


- 51-a Kongreso de ILEI**  
21-28 julio, Madrido, Hispanio  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info)
- 103-a Universala Kongreso de Esperanto**  
28 julio-4 aŭgusto, Lisbono, Portugalio  
Informoj: [www.uea.org](http://www.uea.org)
- 74-a Internacia Junulara Kongreso**  
4-11 aŭgusto, Badaĥozo, Hispanio  
[www.tejo.org](http://www.tejo.org)
- 91-a Kongreso de SAT**  
5-12 aŭgusto, Kragujevac, Serbio  
<https://goo.gl/sgrPWu>

### Aperis jam la 2-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto



La 2-a numero (julio-septembro) de *Unesko-Kuriero* estas preta. Nuntempe ni rajtas esperantigi la gazeton el 7 lingvaj versioj: angla, araba, franca, ĉina, hispana, portugala kaj rusa. Atentu, la portugala lingvo ne estas oficiala lingvo de UN kaj Unesko! Unesko akceptis portugalan lingvon kiel la kurieran lingvon kaj ĝian retpaĝan lingvon. Tio signifas ke Esperanto apogata de Unesko havas grandan esperon. Tio estas ĝuste nia celo por eldoni *Unesko-Kurieron* en Esperanto!

Ĝis nun, niaj volontulaj tradukistoj ĉefe venis el la regantoj de angla kaj franca lingvoj, kaj tre mal multe de la ĉina. Neniu venis el la araba, hispana, portugala kaj rusa lingvoj. Ĉu Unesko povas akcepti nian lingvon kiel la Kurieran lingvon kaj ĝian retpaĝan lingvon, tio dependas de regula eldono, kvalito kaj vasta partopreno de diversaj nacioj kiuj parolas Esperanton. Mi petas ke la parolantoj ankaŭ de la araba, hispana, portugala kaj rusa lingvoj aliĝu al la teamo. Novaj altnivelaj tradukistoj kaj provlegantoj ĉiam estas bonvenaj. Tro da traduka tasko eblas lacigi la nunajn senpagajn tradukistojn. La reta versio estas senpage elŝutebla ĉe <[http://www.uea.org/revuoj/unesko\\_kuriero](http://www.uea.org/revuoj/unesko_kuriero)>. Bv. aliĝi al la teamo de *Unesko-Kuriero* en Esperanto sendante



Kovriloj de la du unuaj numeroj de *Unesko-Kuriero* en Esperanto.

mesaĝon al la kunordiganto kaj redaktoro Trezoro Huang Yinbao <[trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com)>. Bv. disvastigi la informon.

## INFORMILO n-ro 3 DE LA CENTRA OFICEJO (ĝis 2017-08-30, CUP)

### MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2017 (64)

★ **La Habana (32):** Alberto Fernández-Calienes Barrios, Alberto Rodríguez Pineda, Alejandro García Acosta, Ángela María Pedrosa Cuesta, Ariadna García Gutiérrez, Charlie Joan Obregón Cepero, Daimi Doval Delsa, Digna Mayra Morales Burón, Geomar Martínez Pérez, José Evelio Cárdenas Zúñiga, José Luis Hernández Carvajal, Juan Carlos Montero Medina, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Julián Hernández Angulo, Luis Enrique Rizo García, Luis Enrique Sotolongo Gilchrist, Magaly Valdés Serrú, María Antonia Cartaya Martínez, Maritza Gutiérrez González, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Mayra Núñez Hernández, Miguel Ángel González Alfonso, Olga Lidia Barrios Cunningham, Oscar Asensio Pisciotta, Pedro Fernández Rodríguez, Teresa Cepero Tejada, Vilhelmo Lutermano, Yordán

Fonseca Olivera, Noel González Fernández, Ismary Lezcano García, Ramón García Tarragó, Raquel Rodríguez Ramírez. ★ **Mayabeque (1):** Yuniór Benítez Alonso. ★ **Cienfuegos (1):** Alina Zuaznabal Himely. ★ **Villa Clara (8):** Duneski Aguilera Barrera, Eddy Machado Hernández, Ena González Machado, Manuel Antonio Fuentes Gary, Nadia Peeva Miteva, Noelys Caridad González Hernández, Roberto Molina Gálvez, Yusimith Barrera Camacho. ★ **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. ★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisnerov Rovira. ★ **Camagüey (1):** Jorge Luis González Santillán. ★ **Las Tunas (2):** Anida Santiesteban Garcés, Juan Miguel Leyva Carralero. ★ **Santiago de Cuba (8):** Pablo Cabrera Toledano, Guillermo Navarro Toledano, Osiris de la C. Salas Madrazo, Jaime Ginarte Díaz, Graciela Morgado Rodríguez, Manuel Muñoz Laffita, Frances Guibert Sorzano,

Julio César Tamayo Salas. ★ **Guantánamo (9):** Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines, Julia Lescaille Fernández, Leonardo Luna Neyra, María Lisandra González Hurtado, Miguel Luis Vera Challinger, Roberto Claro Guerrero, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory.

### DONACOJ (3 243.00)

★ **Martí-Klubo (1 420.00):** Olga Lidia Barrios Cunningham (100.00), María Antonia Cartaya Martínez (50.00), Pedro Fernández Rodríguez (200.00), Vilhelmo Lutermano (1 000.00), Ángela Pedrosa Cuesta (70.00), Maritza Gutiérrez González (72.00). ★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Pedro Fernández Rodríguez (200.00), Lotumado dum KERo 2017 (215.00), Aŭkcio dum KERo 2017 (250.00), Vilhelmo Lutermano (1 088.00).

*Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.*

**FORPASO.** Julio Martínez Fiallo (Havano, 1934.06.16), Honora Membro de KEA forpasis en San Antonio de los Baños, Artemisa, la 15-an de decembro 2015. Li eklernis Esperanton en septembro 1966 en koresponda kurso kaj daŭrigis la lernadon en kursoj organizitaj de Havana E-Grupo (novembro 1971-majo 1972) kaj Havana E-Rondo (septembro 1973-junio 1974). Martínez Fiallo membris la laborteamon por la fondo de KEA (okto-



bro 1978-junio 1979) kaj estis ĝia estrarano ĝis 1986, periodo dum kiu li respondecis pri instruado, financo kaj publikaj / internaciaj rilatoj. En 1984, la Komitato de KEA nomumis lin Peranto de UEA en Kubo. Fondinto de Esperanta Literatura Tradukmetiejo (1988), ĉe la Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj de Kubo (UNEAC) kaj prezidanto de la Havana Esperanto-Klubo Juan Bacallao (1989-1992), pri informado. Li partoprenis la 1-an, 2-an, 3-an, 4-an kaj 5-an KEA-kongresojn kaj la 75-an kaj 95-an UK-ojn (1990 kaj 2010). Li estis delegito kaj fakdelegito de UEA (1990-1999 kaj 2000-2014).

bro 1978-junio 1979) kaj estis ĝia estrarano ĝis 1986, periodo dum kiu li respondecis pri instruado, financo kaj publikaj / internaciaj rilatoj. En 1984, la Komitato de KEA nomumis lin Peranto de UEA en Kubo. Fondinto de Esperanta Literatura Tradukmetiejo (1988), ĉe la Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj de Kubo (UNEAC) kaj prezidanto de la Havana Esperanto-Klubo Juan Bacallao (1989-1992), pri informado. Li partoprenis la 1-an, 2-an, 3-an, 4-an kaj 5-an KEA-kongresojn kaj la 75-an kaj 95-an UK-ojn (1990 kaj 2010). Li estis delegito kaj fakdelegito de UEA (1990-1999 kaj 2000-2014).

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
Info@esperanto.co.cu  
www.esperanto.cult.cu



## 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto



Havano, Kubo  
11-17 februaro 2018

Informoj kaj aliĝilo ĉe:  
[www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu)

Lingvoj kaj kulturoj:  
edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj

**Amika voĉo el Kubo,  
libera teritorio  
en Ameriko**

[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)



**RADIO HABANO KUBO**

**Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto  
Nun ankaŭ en FM!**

**esperanto.cu** estas trimonata bulteno por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas ĉe [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Cefredaktis kaj enpaĝigis:** Alberto Fernández-Calienes Barrios. **Kunlaboris:** Javier Ramos Nistal, Maritza Gutiérrez González, Juan Ramón Rodríguez Gómez.